8-a JARO, N-o 380 LEIPZIG, 14. / 1. 1932



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

LA KATENITA SCIENCO.

Sur la tagordo estas nuntempe en Italio la faŝismigo de l'universitatoj. Kvankam la faŝista reĝimo instalis, speciale en la jura k sociscienca fakultatoj, novajn katedrojn por la studo de siaj reformoj (ekzemple pri la sindikata rajto, laborĉarto ktp), multaj el la plej konataj profesoroj daŭrigis ĝis hodiaŭ sian instruadon, plene konservante siajn vidpunktojn, interalie liberalajn k demokratajn ideojn. Lastjare la faŝista partio deklaris, ke tia stato ne plu povas daŭri. Kaj oni sciiĝis, ke la partisekretario, plenpova persono, studis la plej bonajn rimedojn por efektivigi kompletan faŝismigon de l' universitato.

Unu el la unuaj agoj estis plifortigi la ekzistantajn organizojn de faŝistaj studentoj. Sekve militministra cirkulero anoncis, ke la studentoj-milicanoj povus rekrutiĝi kun la grado de subleŭtenanto en la armeo, se ili vizitis militist-kursojn dum sia studado. Tiu ĉi avantaĝo instigis kompreneble multajn studentojn sin vesti per la nigra ĉemizo. Alia decido: En ĉiu provinco, reprezentanto de l'student-organizoj partoprenos en la „faŝista direktoraro", kiu okupas sin pri ĉiuj problemoj de l'regiona vivo. Tiel, post militist-edukado ĉe la universitato la studentoj estas destinitaj partopreni, per siaj delegitoj, aktive en la politika vivo. Praktike la tuta junularo enskribiĝas en la „universitataj faŝistaj grupoj", kiuj estas nomataj „volontulaj", ĉar ili donas al la studentoj ĉiuspecajn avantaĝojn k helpas al ili ĉe la komenco de l'kariero.

Rilate la profesorojn, oni intencis unue eksigi ĉiujn, kiuj estis nefaŝistaj k tiel „purigi" la katedrojn. Sed tia ago, kiel oni ekkonis, estus kreinta troajn malfacilojn por la universitata vivo. Tial la reĝimo grupigis unuavice la profesorojn-adeptojn de l' faŝismo en specialaj sindikatoj sub kontrolo de l'partio. Poste la faŝista konsilantaro elektis rektorojn k fakultatestrojn ĉefe inter la faŝistaj elementoj.

Tamen malplimulto inter la profesoroj restis fidela al la liberalaj, demokrataj, individuistaj ideoj, ne volante akcepti plene la novajn doktrinojn. La reĝimo trovis nun la rimedon por venki tiun spiritostaton: ĝi dekretis, ke ĉiuj universitataj profesoroj devas ĵuri fidelon al la reĝimo, „praktiki la funkcion de profesoro k plenumi la akdemiajn devojn kun la celo formi civitanojn laboremajn k sindonajn al la patrio k al la faŝista reĝimo." Tiu ĉi dekreto trudas al ĉiuj universitataj profesoroj, (k al ili sole inter la oficistoj) ĵuron, kiu entenas la plenan, senrezervan k nepridiskuteblan aliĝon al aparta sistemo de politikaj ideoj. Nu, kelkaj profesoroj, sin bazante sur la vidpunkto, ke la politikaj doktrinoj ne estas malpli pridiskuteblaj k submeteblaj al revizado ol ĉiuj aliaj, juĝis, ke temas per tiu dekreto pri intelekta k morala perforto neakordigebla kun la plej altaj devoj de l'scienculo. Ili faris konsciencan demandon el tio k fine aŭ eksiĝis aŭ rifuzis ĵuri. Inter tiuj scienculoj estas la plej eminentaj el tuta Italio. Granda nombro ankaŭ ĵuras, malgraŭ interna kontraŭstaro, timante la konsekvencojn de rifuzo. La profesoroj, kiuj ne konsentas kun la faŝista mistiko, troviĝas antaŭ la alternativo, aŭ enradikigi al sia aŭskultantaro la „faŝisman veron", aŭ rifuzante riski la malsaton, la mizeron aŭ la eksterlandigon.



Desegno de Domje (Daumier).

Rimarkinde estas, ke la Vatikano subtenas la reĝimon *kontraŭ* la profesoroj, kiuj pro ia motivo rifuzas la ĵuron. Ĝi kondamnas ilin ... kiel iam ĝi kondamnis alian universitatan profesoron: Galileo. Ĉar tiu granda itala matematikisto k astronomo ne akordiĝis kun la ĝeneralaj – se oni volas religiaj – direktoj, sed kiuj ankaŭ estis politikaj. Certe, por savi sian vivon, li devis surgenue malkonfesi la „herezon" de sia planeda sistemo. Sed neniam morale li kliniĝis: *Ĝi tamen moviĝas!* Refoje la eklezia potenco batalas brako sub brako kun la laika k malgraŭ ĉiuj diferencoj kun ĉi tiu, por konservi sian superregadon.

Resume, la faŝismo nuligis la universitat-instruan liberon, kiun preskaŭ ĉiuj modernaj ŝtatoj konsideras kiel spiritan akiron k fundamentan rajton. De nun en Italio la profesoroj devos instrui nur tion, kio plaĉas al Musolini.

MEMORE AL DU GRANDAJ REVOLUCIULOJ.



Desegno de K. Kolvic (Kollwitz)

K. Libkneĥt k R. Luksemburg estis murdataj la 15-an de januaro 1919.

„Se oni konas la verkojn de Marks k Engels, se oni konas la vivan, revolucieman, veran, malfalsan spiriton, kiu spiras el iliaj instruoj k verkoj, oni devas esti konvinkita, ke Engels estus la unua, kiu protestus kontraŭ la ekscesoj, kiuj rezultis el la nurparlamentismo, kontraŭ tiu ĉi putrado k degenerado de la laborista movado, kiel ĝi okazis en Germanio, jam jardekojn antaŭ la 4-a de aŭgusto – ĉar la 4-a de aŭgusto[1] ja ne falis el la ĉielo, kiel neatendita fatalo, sed estis logika konsekvenco de tio, kion ni tagon post tago k jaron post jaro antaŭe travivis. Engels, k se li vivus, Marks estus la unuaj, por per ĉiuj fortoj protesti kontraŭ tio k per potenca mano reektiri la ĉaron, por ke ĝi ne malsuprenruliĝu en la marĉon.“ (R. Luksemburg).

„La burĝa demokratio estas falsita demokratio, ĉar la ekonomia k socia dependo de l'laborularo ankaŭ ĉe formale politika egalo donas al la regantaj klasoj objektive grandegan politikan superon k la ekonomia k socia dependo per si mem esceptas realan demokration. Tiel la vojo al la demokratio kondukas trans la socialismon, sed ne la vojo al la socialismo trans la tielnomatan demokration.“ (Karlo Libkneĥt, 28. 11. 1918.)

Luksemburg k Libkneĥt skribis, parolis ĉi tiujn vortojn malmultajn semajnojn antaŭ sia morto, kiu ŝiris tiom kruelan vundon en la korpo de l'germania proletaro dum momento de akrega batalo. La 15-an de januaro 1919 la burĝaro ekstermis ilin per siaj dungitaj murdistoj, la samaj, kiuj hodiaŭ ankoraŭ perfortas en Germanio sub Hitlerana uniformo k eble morgaŭ pli ol iam estos la absolutaj regantoj en la lando.

– Kiel povas esti tia situacio, hodiaŭ, 13 jarojn post la konstituci-ŝanĝa revolucio, en Germanio? – Tio ne okazus, ofte respondas al tia demando revoluciemaj laboristoj, se vivus ankoraŭ tiaj gvidantoj, kiaj estis Libkneĥt k Luksemburg.

Ni ne volas rezoni ĉi tie k esplori, ĉu la du famaj gvidantoj estus insistintaj pri la skismiĝo de la laborista movado postmilita aŭ ĉu ili estus agintaj por kunigi la profundan fendon, kiu nuntempe tiom malfortigas la proletaron, ne nur en Germanio, sed pli malpli amplekse en la tuta mondo.

Ĉiuokaze, ilia pozicio estis klara k firma rilate al la konsekvencoj de duone farita revolucio, kiu lasus esence al la kapitalismo ĉiujn eblojn por plua ekzistado. Supraj citoj pruvas tion. Ili pereis, ĉar ili estis decidaj batalakiri la veran laboristan regadon, ĉar ili ne volis halti sur la ŝtupo de la politike demokrata revolucio, kiu efektive estis nur la rezulto de la milita malvenko.

Kaj rilate al la milito ankaŭ ilia pozicio grave diferencis de tiu de la tiamaj gvidantoj de la socialdemokrata partio. Jam en la Ŝtutgarta Kongreso de la II-a Internacio (en la jaro 1907) estis Roza Luksemburg, kiu kune kun Lenin k Martov proponis k akceptigis radikalspiritan aldonon al la esence de Bebel verkita rezolucio kontraŭ militoj, por malarmado k kiu antaŭvidis kiel rimedon internacian arbitracian tribunalon (pri kies senpovo ni hodiaŭ pli ol iam havas faktajn pruvojn!). Jena estis la aldono de Luksemburg-Lenin-Martov: „Se minacas eksplodi milito, la laborantaj klasoj k ties parlamentaj reprezentantoj en la partoprenantaj landoj estas devigataj, subtenate de la unuiga agado de la Internacia Socialista Oficejo, fari ĉion, por per la aplikado de la al ili plej efike aperantaj rimedoj malhelpi la eksplodon de l'milito, kiuj nature aliiĝas laŭ la pliakriĝo de l'klasbatalo k de l' ĝenerala politika situacio.“

„Se tamen la milito eksplodus, ili estas devigataj agi por ties rapida finigo k per ĉiuj fortoj celi al tio, eluzi la per la milito estigitan ekonomian k politikan krizon por la ribeligo de l' popolo k per tio plirapidigi la forigon de l'kapitalista klasregado.“

Efektive tamen en nenies cerbo temis pri malpermeso de la defendrajto al ajna nacio, se ĝi estus atakata ... ankaŭ ne en la cerbo de Roza Luksemburg, kiu en la „Junius-broŝuro“ (kiu aperis en 1915, do dum la milito mem, neleĝe) subtenis la tezon pri la memdestin-rajto de la nacioj, tamen neante la ankoraŭan eblon de tielnomataj defend-militoj ... (Ni publikigis ekstrakton el tiu broŝuro en la n-o 276 de „S-ulo“.)

Neforgesebla k neforgesinda aliflanke estas la heroa gesto de Karlo Libkneĥt, kiu meze de la buĉado tutmonda, la 1-an de majo 1916 sur la Potsdama Placo de Berlino kriis sian devizon: „Militon al la milito!“ en la vizaĝon de la kanajlaro k deklaris malkaŝe kiel flamsignalon: „La malamiko – ĝi staras en la propra lando!“

Ĉar ili estis sinceraj k nefleksеblaj revoluciuloj, Libkneĥt k Luksemburg devis perei. Bestece mortigis ilin en la sama tago, preskaŭ je la sama horo, la „blankaj“ oficiroj, kiuj stabis en la Edenhotelo en Berlino, dungitaj murdistoj de la burĝaro, ludanta sian lastan karton por savi la reĝimon.

Ni pensas en tiu ĉi jaro tiom pli arde pri la noblaj batalantoj, kiuj mortis la 15-an de januaro 1919 por la laborista afero, ke en Germanio denove regas antaŭrevolucia situacio, k ankoraŭ faŝistaj bandoj, potence organizitaj, pretigas sin por forbuĉi tiujn, kiuj batalas por la socialismo, por la liberigo de l'proletaro.

[1] Dato, en kiu la germanaj socialdemokr. parlamentanoj voĉdonis por la militkreditoj (1914).

Kial ne aperis ĝis nun la Kongres-Protokolaro?

Interkonsente kun la Organiza Kongres-Komitato ni decidis pri broŝurforma eldono de la Protokolaro pri la XI. Kongreso tuj kiam ni sciiĝis, ke la profitsaldo el la Kongreso estas sufiĉe granda por permesi la eldonon. La manuskripto estis preta, k temis nur trovi kiel eble plej malkaran presiston. Inter diversaj ofertoj tiu de la Amsterdama presejo A. De Vries estis la plej favora; ĝi ankaŭ promesis plenumi la laboron dum 4 semajnoj. Ni donis al tiu firmo la komision la 15-an de oktobro; ni do supozis, ke la 15-an de novembro laŭpromese la broŝuro estos presita. Sed la 13-an de novembro ni ricevis la presprovaĵon nur pri la unuaj proks. 20 paĝoj, k malgraŭ la instigoj el Parizo k personaj traktadoj de Amsterdamaj SAT-anoj la preslaboro progresas nur laŭ malrapida ritmo. Tia estas la kaŭzo de la prokrasto.

Nun la plej granda parto de l'broŝuro estas presita, k ni espereble fine povos ekspedi ĝin al la mendintoj...

Direkcio de SAT.

GRAVA AVIZO POR ĈIUJ!

Lastatempe ni ricevis de multaj K-doj instigojn tre kontraŭajn. Iuj diris: „Komence de 1932 vi nepre aperigu denove „S-ulo“-n semajne; vi organizu vastan varban agitadon k vi ne havu dubon, ke la nombro da abonantoj pligrandiĝos. Estu optimistaj, ĉiuj lojalaj k honestaj homoj estas kun vi...“

Sed aŭdiĝis aliaj voĉoj, la pli multnombraj: „Kvankam ni kore k anime estas ligitaj al nia bonega k nepre subteninda gazeto, ni tamen tre verŝajne ne povos renovigi nian abonon en 1932. Ni estas senlaboraj k perdis la esperon baldaŭ retrovi okupon; ni povos nur resti pasivaj membroj en nia kara SAT...“

Dum kelkaj semajnoj ni tre ŝanceliĝis por fari decidon. Estas tamen evidente, ke la nuna ekonomia krizo, kaŭzanta senlaborecon k mizeron, ne baldaŭ formalaperos. Estas eĉ timende, ke ĝi pliakriĝos k sekve trafos pli da niaj K-doj per senlaborigo. Tial, por ebligi al kiom eble plej da SAT-anoj aboni „S-ulo“-n, ni decidis **malaltigi** *la* **abonprezon** *(k entute nian tarifon) k aperigi la gazeton nur dusemajne dum la daŭro de la ekonomia krizo. „S-ulo“ aperos dekdu- k deksespaĝe k entute la legantoj ricevos preskaŭ la saman kvanton da legaĵo kiel antaŭe dum la semajna aperado. Tion ni povos fari malgraŭ la pli malalta abonprezo, tial ke ni ŝparas atentindan sumon en la afrankado per la dusemajna ekspedado.*

Sendube ankaŭ la K-doj, kiuj vivas en iom pli bonstataj kondiĉoj k sekve estus pretaj pagi la ĝisnunan aŭ eĉ pli altan tarifon por semajne aperanta gazeto[1], komprenos bone nian decidon k kontentiĝos dume pri la nuna apermaniero.

Gek-doj! Diskonigu ĉie k ĉien nian novan **plimalaltigitan tarifon!** *Atentigu pri la oportuna pagmaniero (partopagoj por ¼- aŭ ½-jara periodo), kiu ebligas al* **ĉiuj** *senescepte resti en niaj vicoj, legi „S-ulo“-n! Dispelu la indiferenton k la apation! Kuraĝige k optimisme varbu, varbadu kun la prezaro en la mano!... Kaj certe ni povos venke trapasi la krizon por povi poste antaŭeniri per decidaj paŝoj.*

DIREKCIO DE SAT.

[1] K-doj, kiuj jam *plene* pagis laŭ la ĝisnuna tarifo al la Administracio (t.e. por la tuta jaro 1932), povos kreditigi al si la tropagitan sumon sur konto, aŭ ... se ili volas, donaci ĝin por „ŝtopi la breĉon“, t.e. ekvilibrigi la buĝeton.

Nova tarifaro de SAT.

Lando	a) aktiva	b) aspiranta c) subtenanta	Aliĝmono	Nura abono al „S-ulo“
Argentinio, pes.	6.50	2.–	0.50	6.–
Aŭstrio, ŝil.	13.–	3.–	0.50	12.–
Belgio, belg.	13.–	3.–	0.50	12.–
Britio, ŝil.	10.–	3.–	0.50	9.–
Ĉeĥoslovakio, kr.	60.–	15.–	3.–	55.–
Danio, kr.	10.–	2.–	0.50	8.–
Estonio, kr.	8.–	1.50	0.25	7.–
Finlando, mk.	85.–	18.–	4.–	80.–
Francio, fr.	40.–	12.–	2.50	35.–
Germanio, mk.	8.–	2.–	0.50	7.–
Hispanio, peset.	15.–	5.–	1.–	13.–
Hungario, peng.	10.–	2.–	0.50	8.–
Japanio, jen.	5.–	1.50	0.50	4.–
Jugoslavio, din.	110.–	25.–	6.–	100.–
Latvio, lat.	10.–	2.–	0.50	8.–
Litovio, lid.	18.–	4.–	1.–	15.–
Nederlando, guld.	5.–	1.50	0.30	4.–
Norvegio, kr.	10.–	2.–	0.50	8.–
Polio, zlot.	15.–	3.–	0.80	12.–
Portugalio, esk.	45.–	10.–	2.–	40.–
Svedio, kr.	10.–	2.–	0.50	8.–
Svisio, fr.	10.–	2.50	0.50	8.–
Usono, dol.	2.50	1.–	0.25	2.–

Ĉiuj ne cititaj landoj pagu laŭ la tarifo por Francio.

Por ŝtopi la breĉon

8. listo

Gek-doj O. Melton (Birmingham)	mk.g.	5.–
Sekcio Amsterdam XIII	guld.	5.–
13025 H. W. Alings (Amsterd.)	guld.	0.50
Sekcio Amsterdam I.	guld.	0.15
15855 Fr. Bertram (Leipzig)	mk.g.	0.50
17319 J. G. Rosell (Mälarhöjden)	kr.sv.	5.–
16132 D. Cyprien (Sonvilier)	fr. sv.	2.–
14562 E. Zachte (Amsterdam)	guld.	1.30
7602 J. Harris (Leicester)	mk.g.	4.–
Libervolaj donacoj, Pelcman (Plzen)	kr.ĉ.	45.–
13257 Polgar (Parizo)	fr. fr.	50.–
9542 J. Wild (Zürich)	fr. sv.	5.–
16664 C. Wijn (Hilversum)	guld.	1.50
16340 Wilson E. (Halifax)	ŝil.	2.–
J. Wijngaarden (Bevervijk)	guld.	1.50
„Nul Svedio“	mk.g.	3.52
Sekcio Amsterdam II	guld.	3.–
17484 C. Delsen (Amsterdam)	guld.	1.–
1795 Hejda V. (Wien)	mk.g.	1.45
14212 G. Douet (Vincennes)	fr.	10.–
16905 (Störmede)	mk.g.	0.79
Munoz (Paris)	fr. fr.	5.–
492 Bonnet (Saint-Etienne)	fr. fr.	5.–
16903 Verot (Saint-Etienne)	fr. fr.	10.–
17157 Hoogendijk (Amsterd.)	mk.g.	1.15
Kvar Helsingborgaj frakcianoj	kr.sv.	5.–
Klubo Esperantista de Tramistaro (Göteborg)	kr.sv.	11.–
Willesden-Grupo, BLEA (Lond.)	ŝil.	7/6
13027 Rindler G. (Los Angel.)	dol.	1.–
17340 Kurt Werner (Leipzig)	mk.g.	2.–
SAT-Rondo Nov-Jorko (E. Dann)	dol.	11.50
Trebs-Weinhold (Leipzig)	mk.g.	1.95
13157 Melton O. (Birmingh.)	mk.g.	1.71

Granda striko en la Nederlanda teksindustrio.

En la mezorienta parto de Nederlando, en la regiono nomita Tvente (urboj Enschede, Hengelo, Borne k Almelo), estas multe da teksindustrio. Ĉ. 18 mil laboristoj havas okupon per ĝi: El ĉi tiuj estas ĉ. 78% organizitaj, ne en unu sindikato, sed en 4 diversaj. Ekzistas nome protestanta, katolika, socialdemokrata k liberecana sindikatoj; la socialdemokrata havas pli da membroj ol la 3 aliaj kune; la liberecana enhavas nur 5% el la tuta organizita tekslaboristaro. La fabrikestroj ĉiuj estas organizitaj en unu tutregiona unuiĝo. Kiam ĉe unu aliĝinta firmo okazas striko, la aliaj devos, ĉu per lokaŭto, ĉu alirimede, helpi ĝin.

La tekslaboristoj estas malbone salajrataj, laboras 48 horojn semajne k ne havas eĉ unu tagon da libertempo en la tuta jaro. En ĉi tiu industrio oni komencis en la lastaj jaroj raciigi. Sekve de ĉi tiu raciigo unu laboristo kun helpanto, kiuj antaŭe laboris ĉe 6 teksiloj, nun devas prizorgi 8, 10 aŭ eĉ 14 teksilojn k tamen la salajroj restis la samaj aŭ ... eĉ malpliiĝis.

Ĉi tiu malbonigo kaŭzis ĉe la laboristoj grandan malkontenton k estigis ĉe unu fabriko en Enschede post intertrakto inter fabrikestro k sindikatoj decidon proklami la strikon, se la postuloj de la sindikatoj ne estos plenumitaj antaŭ la 17-a de novembro.

Kvankam ankoraŭ venis la regna interpacigisto, la konflikto ne estis solvita la 17-an de novembro. Tiam komenciĝis la striko. Unu semajnon antaŭe la entreprenistoj en nia tuta regiono sciigis, ke oni la 14-an de nov. malaltigos la salajrojn de ĉiuj laboristoj je 5%. Kompreneble la laboristoj ne volis akcepti tion. Ankaŭ la sindikatoj opiniis, ke oni ne povas konsenti. Ĉie oni atendis, ke la 24-an de nov. komenciĝos striko en la tuta industrio. Granda estis la entuziasmo inter la laboristoj. Sed en la lasta momento la estraroj de la religiaj sindikatoj (ne la membroj) ŝanĝis sian starpunkton k pro la granda krizo ili estis kontraŭ striko k ordonis al siaj membroj sub protesto akcepti la malpliigon. Malgraŭ la fortegaj protestoj de la membroj tio okazis. Dume la striko en la unua nomita fabriko daŭris. Post unu semajno la fabrikestroj sciigis, ke, se la striko en tiu fabriko la 28-an de nov. ne estus finita, ili la salajrojn de ĉiuj laboristoj en la teksindustrio denove plimalaltigus je 5%. En la sama momento, kiam oni tion sciigis, en 4 fabrikoj oni ĉesis labori, ne demandinte la opinion de la sindikataj estraroj. La socialdemokrata k kristanaj sindikatoj instigis siajn membrojn, ne striki, sed daŭrigi la laboron, dum ili decidus pri la rimedo kontraŭ tiun denovan salajro-malpliigon. La Federacio (la liberecana sindikato) opiniis, ke necesas tuj striki k per afiŝoj k alporoloj ĉe la fabrikoj ili instigis la laboristojn al tio.

La 30-an de nov. jam je la 7-a (la laboro komenciĝas je la 7½-a) granda amaso estis antaŭ la pordoj de la fabrikoj. Ege oni disputis pri tio, kio devas okazi. La rezulto estis, ke en Enschede diversaj fabrikoj ne povis funkcii; tie oni strikis. Tuj ekestis manifestacio, al kiu partoprenis proksimume 2000 strikantoj. Do, kio okazis ankoraŭ neniam, malgraŭ la kontraŭstaro de la tri sindikataj estraroj la striko estis fakto k la sekvontajn tagojn la nombro da strikantoj ĉiam pli k pli kreskis. Tamen la tri estr-

aroj ankoraŭ ne finis sian filaboron. Sekvantan vesperon ili kunvenis k decidis, ke striko en ĉiuj fabrikoj komenciĝu la 14-an de decembro, k denove ili ordonis al siaj membroj eniri la fabrikojn; ke tiuj, kiuj tamen daŭrigus la strikon, ne ricevus financan subtenon.

Denove grandega ekscito inter la teksistoj k precipe inter la membroj de la Federacio. Kio estus la respondo? La respondo de la laboristoj estis, ke la nombro da strikantoj ankoraŭ kreskis. La 2-an de dec. dum la tuta tago okazis protestmanifestacioj antaŭ la oficejoj de la tri sindikatoj, precipe ĉe la socialdemokrata. Tiel fortaj estis la protestoj, ke jam samvespere la estraro de l'socialdemokrata sindikato devis ŝanĝi sian starpunkton k publikigis, ke ili finance subtenos siajn membrojn, sed ili ne volas esti respondaj pri la striko. Tiu ĉi komenciĝu la 14-an de decembro. Sed la 3-an la nombro da strikantoj preskaŭ duobliĝis. Nun jam estis proks. 8000 strikantoj. Tamen ankaŭ la mastroj ne dormis. Dum tiu tempo ili komencis dissendi leterojn, per kiuj ili sciigis, ke la strikantoj estas maldungataj. Sed la laboristoj nur ridis pri tio.

Tiel alvenis la 14-a de dec., k nun ankaŭ la tri sindikatoj proklamis la strikon, kiu nun estas fakto: 14 mil strikantoj (en kelkaj fabrikoj oni ne strikas). Tiel estas nun la situacio. Kio nun okazos, ni ankoraŭ ne scias, sed vere estas, ke la batalo de la teksistoj estos peza k malfacila. Tion ni jam ofte spertis. Tamen ankaŭ estas vere, ke la batalo estas bona k justa, tion pruvas la simpatio de la tuta nederlanda laboristaro.

J. P. (1940).

La situacio k okazoj en Usono.

Estas konstatebla ia *ŝtelira timo inter la kapitalistaro usona.* Pro ĝi ektremis la konfido al la nuna ekonomia sistemo ĝis grado ne komparebla kun la relative tre granda egalanimeco de kapitalistoj en Eŭropo. La usona kapitalistaro ja alfrontas la prokrizan mizeron nur depost kelkaj jaroj, sed ĝi estis ĵetata en la mizerondegon subitege, dum en Eŭropo oni alkutimiĝis dum jardeko al la sama stato.

Tiu ĉi maltrankvilo esprimiĝas en la tuta gazetaro per *reklamo-militiro kun la celo „restarigi la konfidon“*. Ĝi estas kvazaŭ la plej grava okupo de ĉiuj politikistoj. Oni uzas tiucele plej ridindajn rimedojn, ekz. ĉiu fama k fameta persono almenaŭ ĉiusemajne profetas la revenon de la „prospero“ k diras, ke „ĝi estas ĝuste malantaŭ la angulo“. Tamen oni komencas singardi en la rondoj de la antaŭdiristoj.

Gravega bankĵurnalo insistas, ke okazu pli da *salajromalaltigoj* k diversspecaj kostoreduktoj, kiuj signifas *maldungon al multaj laboristoj.* Estas notinde, ke ĝi kontente rikanas, ĉar „la laboristoj propravole (?) konsentis al salajroreduktoj“.

Laŭ ĝi *bankrotoj de bankoj* iom malpliiĝis. Estas interese, ke la laboristoj eksciu, ke dum nur la unua semajno en novembro 76 bankoj devis fermi siajn pordojn pro nepagpovo. Tiu nombro jam indikas malpliiĝon, ĉar dum oktobra semajno bankrotis 166. Oni povas imagi, kia paniko regas inter la deponintaro. Multegaj laboristoj perdis siajn ŝparaĵojn, kiujn ili esperis havi dum „malbonaj tempoj“. Inter la grandaj bankrotintoj ankaŭ troviĝas la plej granda *„laborista banko“*.



Kiom akraj estas la efikoj de la anima premiĝo, videbliĝas el la fakto, ke fariĝis kutimo lui malgrandajn loĝejojn k du aŭ *pluraj familioj kunloĝas en unu hejmo*, malgraŭ ke troviĝas multaj malplenaj apartamentoj. Rezulte el tio domposedantoj ne povas amortizi siajn ŝuldojn k oni forprenas ilian havon. Post tio bankoj devas retranspreni la „frostiĝintajn pruntedonojn“, el kiuj ne enspeziĝas rentumo.

La plej akrajn kapdolorojn ĉe la usona kreditormondo kaŭzas la *bankroto*, kiu ree *minacas al la germana respubliko.* Ju pli la sentimento turnas sin al la nacisocialistoj, des pli da zorgoj leviĝas ĝis nun ĉiumatene kun la kapitalisto. La gazetoj uzis fortajn vortojn kontraŭ partopreno de nacisocialistoj en la regado de Germanio. Sed pli k pli evidentiĝas la muta espero, ke post ekposedo de ministroseĝoj la laŭtaj krioj pri „revenĝo“ de Hitleranoj forventoliĝos. Ju pli multiĝas la promesoj de la Hitler-granduloj esti bonkondutaj al la kapitalistoj, des pli da *favorstrabaj rigardoj direktiĝas al la faŝismo.* Oni spekulacias, ke la plenumpolitiko daŭros eĉ pli efike sub la egido de l'nacisocialismo. Almenaŭ ĉiu kontraŭstaro de la germana laboristaro malaltigi la vivtenadon al mezepoka nivelo estos certe dronigata en sango. Neniu alia forto povus tion atingi tiel bone kiel la faŝismo. Do, oni fariĝas konsentema k *jam raportas ekprenon de l'potenco fare de Hitleranoj* kiel tre baldaŭan okazontaĵon. Samtempe estas antaŭdirita *nova inflacio* interlige kun tio. La bilanco de l'germana regna banko montras nur proporcion de 26,7% da rezervoj kontraŭ la ŝuldoŝarĝego.

Kun granda reklamtamburado la urbestro de Nov-Jorko veturis Kalifornion *„por liberigi T. Muni (Mooney)“*. Alsvarmis tien multegaj famaj politikistoj, el kiuj ĉiu subite malkovris sian bonan koron por fari la samon. Estas publika onidiro, ke pro politikaj konsideroj la elkarcerigo de Muni estas antaŭsciigita afero. Ili volas profiti la okazon por varbi voĉojn al siaj respektivaj partioj dum la elektoj en 1932.

La laboristoj ne fidu al la manovroj. Nepras daŭrigi la agitadon por la liberigo de Muni.

Kentuki-ministoj estas ankoraŭ sub minaco esti ekzekutotaj sur elektra seĝo. La unua el la granda nombro da akuzitoj estas malkondamnita. La ĵurintaro agnoskis ĉi-okaze la rajton pri memdefendo. Tuj la prokuroro proponis k akceptigis ŝanĝon en la akuzformulo, tiel ke nun la ministoj estas kulpigataj pri „konspiro k mortigo“. La celo estas enkonduki debatojn pri „ruĝa k sanga komunismo“ por antaŭjuĝigi la ĉesidantan ĵurintaron k artifike rezultigi kondamnon. La alveturigo k subtenado de pli ol cento da atestantoj kaŭzas preskaŭ neelporteblan elspezon por la Ĝenerala Defend-Komitato. Minacas la hejmentransporto de multaj atestopretaj personoj pro manko de monrimedoj. La artifiko de la prokuroro okazigi la proceson en alia regiono malproksima al la „farloko“ do portas siajn fruktojn. Estas timende, ke pro tio la rezulto de la proceso estos kondamno, malgraŭ ke ĝuste nun akuzatestantoj envolviĝas konstateble en falsĵuro. Al la sekretario Herberto Maler (adr.: General Defense Committee, 555, West Lake St., *Chicago*, Ill.) sendis kelkaj esperantistaj K-doj kontribuon, sed la ideo estis organizi helpon de ĉiu laborista organizo pro la grando de la juĝafero. Imitindan solidaron montris la norvegaj sindikatoj, kiuj sendis jam preskaŭ 300 dolarojn, granda ofero por la norvegiaj laboristoj. Ankaŭ el Hungario venis atentinda sumo. Estas esperinde, ke

Por ke „LA NOVA EPOKO“ pluvivu

14212	*G. Douet (Vincennes)*	*fr. 10.*
3958	*D.Dambe (Johannesb.)*	*mk. 9.40*
13025	*Alings (Amsterdam)*	*guld. 0.50*
5877	*De Bruin-Vels (Enschede)*	*mk.g. 4.–*
13257	*Polgar (Parizo)*	*fr.fr. 50.–*

la SAT-anoj alarmos siajn organizojn eksteresp-istajn por helpi en la defendado de laboristoj *akuzitaj* fakte *pro organiziĝemo*. Ne timu, ke estas tro malfrue. La proceso ne ĉesos rapide. Multaj malgrandaj kontribuoj eble helpos forŝiri la viktimojn el sub la unggegoj de malkaŝe al karbbaronoj servemaj juristoj. Agu, K-doj, diskonigu la faktojn pri la atenco kontraŭ organiziĝemaj laboristoj!

En apuda *Kanado* okazis *proceso kontraŭ* gvidantaj membroj de la *kompartio*. Ilin trafis kondamno k la partion plena malpermeso. Atentinda trajto el la proceso estis, ke en la ĉefinstanco troviĝis dum multaj jaroj polica spiono, kiu havis absolutan fidon de la partianoj k nun aperis en sia riĉe pasamentita uniformo antaŭ la juĝisto por eldiri kontraŭ „siaj K-doj".

Laboristoj en ĉiuj landoj lernu el ĉio ĉi. La kontraŭdiroj de la kapitalista sistemo fariĝas pli akutaj k la persekutoj pli kruelaj en ĉiuj landoj. Tutmonda klasbatalo k solidaro de unu al ĉiuj k ĉiuj al unu finos la ekspluatadon de l'homo al homo sur la tuta tero.

Veder (1307).

Novaĵoj el Estonio.

La socia vivo en Estonio dum la pasintaj semajnoj tre aktiviĝis. Samkiel ĉe la laboristaro, ankaŭ ĉe la burĝaro oni rimarkas pli multe da agemo k batalemo ol pli frue.

En nia universitata urbo Tartu la germanoj malfermis sian propran akademion. La ministro por klerigaj aferoj (socialisto), konsiderante liberon de nacioj en Estonio, permesis tion. Pro tio la estonaj naciistoj estas tre ekscititaj. Ne nur, ke en la parlamento oni forte protestis kontraŭ la malfermo de tiu akademio, sed la naciaj studentoj ankaŭ kelkfoje aranĝis „katkoncertojn" antaŭ la fenestroj de l'germana akademio k eĉ sangbatis kelkajn germanajn akademianojn!

La naciaj studentoj ankaŭ komencis per pugnoj labori kontraŭ junsocialistoj. La lastaj fariĝis tre aktivaj dum la pasinta jaro, aranĝas ĉie tre popularajn k grandamase partoprenatajn amaskunvenojn kun tre varia programo, el kiu ne forestas ankaŭ kabaredaj prezentoj, primokantaj naciajn k religiajn junularmovadojn, k kie oni kantas pamfletajn, ironiajn kantojn laŭ la naciaj k religiaj melodioj. Ĝuste kontraŭ ili direktas siajn paŝojn la agado de l'naciaj studentoj, kiuj estas eĉ pretaj uzi la pugnojn. Tamen la junsocialistoj vekas pli k pli da simpatio inter la laborista junularo k lernantaro.

Faŝista movado.

Evidentiĝis, ke ankaŭ en Estonio, laŭ modelo de finnaj „lapua"-movadanoj, la burĝoj preparas perfortan ŝanĝon de l'nuna demokrata reĝimo, por anstataŭigi ĝin per faŝista. La gvidantoj de tiu movado estas precipe la gvidantoj de l'ŝtata defendligo, libervola privata armeo, kiu devus esti en la servo de l'respubliko k kiu tiucele ricevas por siaj ĉiaspecaj elspezoj grandegajn sumojn de l'ŝtato. Tamen, nun evidentiĝas, ke ĝuste la gvidantoj de tiu ligo preparas perfortan reĝimŝanĝon por subigi al si la demokration k kompreneble la proletaron. La sekretaj trupoj de tiu sekreta ligo estas malkaŝitaj k estoniaj laboristorganizoj k -gazetoj postulas plej fortan punon al tiuj personoj.

En la sama defendligo oni malkaŝis ankaŭ egan korupton, kiu daŭris jam dum 3 jaroj. Dum tiu tempo unu el la gvidantoj foruzis pli ol 30 000 kr.

LASTA AVIZO!

Ĉiu K-do atentu, ke ĝis la 25-a de januaro lia kotizo — aŭ parto ĝia — estu pagita al la Administracio de SAT, por ke lia nomo k adreso estu enskribita en la nova JARLIBRO! Eĉ kvaronjaraj pagoj validas.

(fakte temas pri ŝtata mono). Kvankam la estraro sciis jam pli frue pri tiu korupto, ĝi ne forigis la monmisuzanton de lia posteno, ĉar li estis ja unu el la plej honorataj gvidantoj. Nun fine li devis eksiĝi, sed nenian punon li ricevis. Tamen, se la ŝtata etoficisto pro sia mizerstato foruzas eĉ kelkajn kronojn, oni kondamnas lin per multjara malliberigo...

Privata „bonfarado".

Por plibonigi la mizeron de senlaboruloj la burĝaj „filantropinoj" ekorganizas socian privatan helpon al mizeruloj. Oni veturas per aŭtomobiloj de hejmo al hejmo, petante donaci malnovajn vestojn, meblojn, ankaŭ monon, manĝaĵon ktp, kion la filantropinoj disdonas al senlaboruloj. Kompreneble — tre humana ago. Iliaj edzoj en siaj entreprenoj elsuĉas el laboristoj ilian lastan laborforton por mizersalajroj, kiuj estas relative (laŭ statistiko de l'Labor-Oficejo en Ĝenevo) el plej malaltaj en la tuta mondo k ĵetas la nelaborpovajn, ekspluatitajn laboristojn malantaŭ la fabrikpordegojn, dume amasigante siajn enspezojn; sed la sinjorinoj okupas sin pri mizerulhelpo... Tamen, ne ĉiuj senlaboruloj ricevas de ili helpon, kontraŭreligiuloj k kontraŭŝtatuloj estas esceptataj, laŭ propono de kelkaj pastroj. Kontraŭŝtatuloj estas kompreneble ĉiuj organizitaj laboristoj, laŭ opinio de l'burĝaj filantropoj. Tie ni vidas la veran flankon de l'burĝa filantropia agado.

La registaro, en kiu nun kunlaboras ankaŭ socialistoj per du ministroj, decidis doni subvencion al la senlaborularo per komunumaj laboroj, donante por tiu celo el ŝtata mono pli ol 621 000 est.kr. (1 est.kr. iom pli valoras ol germ. marko). Jam ricevis laboron pli ol 4000 senlaboruloj. Estas notinde, ke pasintjare samtempe, dum nur burĝoj regis, ricevis laboron nur iom pli ol 100 senlaboruloj...

Laborej-elektoj.

La nova socia leĝo, laŭ kiu laboristoj en ĉiuj laborejoj rajtas k eĉ devas elekti por si estrojn, perantojn inter laboristaro k laborejmastroj k gvidantojn de laboristoj en iu entrepreno, spertis egan kontraŭstaron inter la entreprenistaro. Ili oftege penis malhelpi la elekton de perantoj, timante, ke per tia organizado la laboristaro pli k pli klaskonsciiĝas k ekpostulos plibonigojn multrilatajn. Malgraŭ la ĝenerala kontraŭstaro de l'mastroj, la elektoj sukcesis bone, ĉar la malhelpantajn mastrojn oni punas laŭleĝe. Ankaŭ nun ne plu la mastroj havas rajton maldungi la laboristestrojn; se ili tion faros, ili estos punataj. Kelkloke la laboristoj eĉ devis surŝultre forigi la agentojn de mastroj el la elektolokoj, por efektivigi siajn elektojn.

Laŭ laborstatistiko estis dum pasinta jaro en Estonio nur 5 strikoj. 4-foje la laboristoj strikis pro tio, ke ili ricevis tre malregule, aŭ dum longega tempo tute ne ricevis salajrojn. En tiuj striketoj la laboristoj venkis. En kvina kazo laboristoj postulis salajrplialtigon, parte je 20 %, parte pli. La mastroj plialtigis la salajron je 20 %, sed en la fako, kie oni postulis pli grandan salajrplialtigon, ĉiuj laboristoj, nome 32, estis maldungitaj k anstataŭ ili estis dungitaj novaj.

La malobeo al laborprotektleĝoj, fare de mastroj, okazis en pasinta jaro 7102-foje (en antaŭa jaro — 5733). Nur 1307-foje la laborprotekt-inspektistoj (kiuj ja plejparte estas burĝoj, enoficigitaj de burĝaj registaroj) faris protokolojn al mastroj k 1227-foje ja mastroj ricevis monpunon pro malobeo al tiuj leĝoj. Ordinare, kiel montras la statistiko, la inspektistoj nur faris al la mastro rimarkon. Ankaŭ la monpunoj ne estis konsiderinde altaj, tial la mastroj tre sentime malobeas al tiaj leĝoj.

Neeme Ruus (15 428).

Letero el Finnlando.

En Finnlando agis dum la lastaj 2 jaroj faŝista reakcio per tre fiaj rimedoj. Preskaŭ ĉiun tagon oni povis legi pri mortigoj, vundoj, forpeloj trans la rusan limon ktp. La agado unue estis direktita kontraŭ komunistoj, sed samtempe ankaŭ kontraŭ ĉiuj lab. organizoj. Eĉ liberalaj burĝoj ne sav-

iĝis. Oni ja konas la peraŭtomobilan forpelon je eksprezidanto Stohlberg.

La komunista movado, kiu estis ŝajne forta, sed fakte malforta, falis ĉe la unuaj atakoj de l'faŝistoj. Preskaŭ nenia kontraŭago estis videbla. Depost tiam ĝi entute ruiniĝis, k nun oni ne plu aŭdas pri ia komunista movado en la lando.

La faŝista reakcio nun havas sian atakobjekton en la socialdemokrata k la kleriga lab. movado. Tiuj tamen ne estas facile ruinigeblaj, k ni povas diri, ke neniam faŝistoj povas pereigi la socialdemokratojn en Finnlando.

Nun ŝajnas, ke ni baldaŭ denove povos kolekti la disigitan laboristaron k komenci ankaŭ fortan klerigan laboron. Tiam ni ankaŭ esperas, ke esperanto komencos vivi k flori inter la laboristaro. Lab.Esperanto-Asocio agas, laboristaj turistoj povis praktike montri la grandan signifon de mondlingvo. En niaj najbaraj landoj, en Estonio k en Svedio estas esperantomovado forta k ni penas sekvi ilin.

La venontan someron okazos en Helsinko Nordlandaj junsocialistaj tagoj. Tiam ni inter la junularo agantaj K-doj aranĝos internacian feston, en kiu la tuta programo estos esperantlingva, por montri, ke esperanto jam nun estas vere vivanta internacia lingvo. La programon faras entute junsocialistoj mem en nordlanda skalo. Estas espereble, ke esperantistaj socialistoj tiam multnombre kolektiĝos en Helsinko.

Väinö Ahde (13 898).

Poezio malaperas . . .

Stato de ministoj en sveda Laponio.

La plej bonan staton inter la sveda laboristaro havis ĝis lastaj jaroj la ministoj en Laponio, en ferercmineja distrikto. Ilian bonan staton komparis la esp.-instruanto Henriko Seppik antaŭ unu jaro en „Heroldo" kun la stato de estonaj profesoroj! Vere, tie ĉi multaj ministoj havas proprajn domojn k ili *havis* ĝis pasinta jaro salajron bonegan, 400 – 500 kr. monate. Dum somero ili aranĝis por si k sia familio longajn vojaĝojn al meza k suda Svedio, ne tro malŝparante monon.

Nun subite tia poezio malaperis. Ĉie oni rimarkas ŝparegemon, la meblaro ne plu multe noviĝas per novaj pecoj, ktp. Kio do okazis? Svedion ja ne turmentas la militŝuldoj, nek aliaj internaciaj financaj devoj. Erco en ercmontoj ne elĉerpiĝis, ankoraŭ Laponio havas en sia tereno 900 – 1000 milionojn da tunoj da fererco, kiun prilabori oni povas per nuna kvanto da laboristoj dum pli ol 200 jaroj.

La kaŭzoj estas ekster Svedio. Ercon uzas ja aliaj landoj, plejparte (60 %) la germana Rur-industridistrikto. Tie la laboro haltas aŭ plimalgrandiĝis, sekve ankaŭ tie ĉi oni devas de tempo al tempo maldungi jen 100, jen 200, jen pli da laboristoj! Tiuj, ofte familipatroj, devas kun sia tuta familio forlasi la malvarman polusdistrikton, restigante siajn domojn tie ĉi sen loĝantoj, ĉar ne ekzistas aĉetantoj. Jen oni vidas en Porjus, kiel staras malplenaj multaj laboristaj domoj, kies mastroj forloĝiĝis al aliaj partoj de la lando, esperante tie trovi almenaŭ ian laboron, ĉar tie ĉi, en la ercregiono, ne ekzistas alia industrio krom ercminado.

Ne helpis, ke multaj laboristoj estas maldungitaj. Laboro ne sufiĉis ankaŭ por la restintoj. Oni laboras nur 4 tagojn semajne. Nun la laboristoj gajnas nur 250 – 300 kr. monate, devante pagi el tiu sumo tre altajn impostojn, komunumajn k asekurajn, kiuj ofte forprenas de laboristo ĝis 75 kr. monate! La familiaj loĝejoj kostas 50 – 70 kronojn monate, por soluloj unu ĉambro 30 – 40 kr. Tutmonata manĝo en manĝejo kostas 75 – 100 kr. Ne plu oni havas rajton paroli belajn vortojn pri bonega stato de l'sveda laboristaro.

Senlaboreco ne regas nur inter la ministoj, sed ankaŭ ĝenerale. Minejoj laboras nur 4 tagojn semajne k kun pli malgrandigita laboristaro, sekve, ankaŭ la trafiko sur fervojoj pli malgrandiĝis k oni maldungas la fervojistojn.

La ercregionaj urboj en sveda Laponio havas saman sorton, kiel multaj usonaj minejurboj. Tie ĉi la urboj aperis nur post la jaro 1898, kiam oni komencis laŭplane la laboradon en minejoj. Laboristoj venis tien ĉi el tuta Svedio. Nun, kiam la laboro tie ĉi haltas, ili reiras al siaj hejmaj lokoj, kie estas iliaj parencoj. La urboj, okaze de l'absoluta laborhalto, preskaŭ malpleniĝos.

N. Ruus (15 428) el Estonio.

Resumo de senpartia enketo tra Sovetio.

(Fino. Vd. antaŭan n-on).

Fraŭlino *Elnjo Majar (Maillart)*, pri sporto: „. . . sed mi devis forveturi admirante la inteligenton, kun kiu oni tie okupiĝas pri ili k enviante ilian sorton, decidojn k garantiatajn asekurojn. . . – oni antaŭe diris al mi en Parizo, ke la rusa junularo estas interesa k mi revenas aldonante, ke ĝi eĉ indas gratulon k helpon. . ."

Grafo Karolyi, pri la agrara revolucio de 1928, konkludas:". . . antaŭ tiu ega eksperimento pri socialisma ekonomio, oni povas sin teni por aŭ kontraŭ, sed nei ĝian historian gravon por la rusa ekonomia vidpunkto, same kiel por la vidpunkto de l'monda politiko estas neeble por ĉiu prudenta homo. Estas la unua fojo dum la historio de l'civilizo, ke ŝtato enkondukas ekonomian administron en tiom vasta skalo k precipe en unu el la plej malantaŭaj agrarlandoj de la civilizita mondo. . . . La problemo, kiu nun stariĝas, estas jena: Se la ekonomia metodo adoptata de Sovetio sukcesas atingi sian celon – pri kio mi ne dubas, de kiam mi vidis per miaj propraj okuloj tion, kio okazas nuntempe en Sovetio, – ĉu ĝi ne devigos la alian duonon de l'mondo sekvi la saman ekzemplon?! Ĉar tiuj du tute kontraŭaj sistemoj, kapitalisma k socialisma, ne povos resti longtempe unu antaŭ la alia. La rusa ekonomia „plano" estas pli ol devizo; ĝi estas realo; ĝi estas la ĝenerala linio de politiko, kiu penetras eĉ en la plej izolitan vilaĝon de tiu vasta lando k kies taskon la kamparanoj plenumas entuziasme. Tiu „plano" estas tiom ĝoje akceptata de la kamparanara volo, ke ĝi donas la impreson pri la hierarkio de l'moderna armeo. . . La ekonomia stabo de Sovetio ellaboras la necesajn mezurojn, kiuj estos detale aplikataj al la diversaj branĉoj de la socia organizado. La harmonio inter la konsumado k la produktado estas ebla nur tial ke la ekonomia stabo posedas *ĉiujn* riĉojn de la lando k samtempe ne estas ĝenata de tia anarkio, kiu vole nevole produktiĝas ĉe individuisma ekonomia sistemo.

En tiaj kondiĉoj oni ĉiam havas avantaĝon, ĉar se okazas eraro en la taktiko, oni facile ĝin trovas k riparas dank' al atento, kiun la direkcio donas konstante al la tuta ekonomio de la lando, aplikante nur mezurojn, kiujn la sperto liveras dum preparaj provoj. Cetere, la agrara ekonomio direktata socialisme havas avantaĝon super la kapitalisma, ĉar la unua sistemo utiligas tuj la teknikajn progresojn dank' al la unuiĝo de la kampoj k la scienca spirito, kiu direktas la tutan laboron, dum la dua interrompas tiujn progresojn pro la divido de la kampoj k industrioj k la konservemo de la kamparanoj precipe, kiel oni povas konstati en Usono mem. . . . Estas fakto, ke por tio Sovetio bezonas multajn teknikajn kadrojn; tial ĝi estas devigata dungi plue 25 mil fremdajn specialistojn dum la jaro 1932; tamen, baldaŭ Sovetio sukcesos havigi al si tiajn kadrojn el siaj propraj anoj dank' al siaj riĉaj fontoj. . . . Ne estas malpli fakto, ke tiaj malhelpoj ĝenas la rapidon al socialismo, sed mi reportas jenan certon: same, la direkto de la *agrara ekonomio*, kiel la *kolektivemo* en la kampaj laboroj, ambaŭ faktoroj ripozas sur la spontanea volo de tiuj vastaj amasoj kiel cemento. Reiri al individua ekonomio estas ne imageble por ili, k kredi, ke estas la diktaturo, kiu trudas al ili tiun sistemon, estas eraro, ĉar eĉ la ĉiam grumblantaj maljunuloj komprenas, ke la maŝino estas ne nur multe pli produktokapabla k fonto de prospero por ili, sed ke estas eĉ neeble al la kulakoj disponi pri tiom

perfektaj laboriloj; k plue ili vidas jaron post jaro la kreskon de la produktado en siaj kolektivaj laboroj. Krome la nuntempa registaro havas la junularon kiel plej fervoran defendanton, kiu estas entuziasma partiano de la kolektiva ekonomio.

S-ro *M. Ŝadurn* (Chadourne) pri kontraŭreligia movado:" ... la programoj de la lernejoj konsistas el diversaj specialaj kursoj, el darvinismo k scienca materialismo ... la ateista librejo nur dum la lasta jaro eldonis 300 verkojn pri darvinismo, astronomio, etnografio k primitiva menso. Plie ĝi eldonis kelkajn tradukojn: „Kiel la homo iĝis homo" (de Darvin), „la franca revolucio k eklezio", „la bapto de Rusio" ktp. Krome oni eldonas diversajn sendiulajn gazetojn en multaj naciaj lingvoj k ankaŭ en esperanto. La pastroj antaŭ tiu ĝeno penis fondi „ruĝan eklezion" por pli bone saboti la Planon. certe, ĉar ili diras, ke „homoj ne devas *plani*, nur dio tion povas k rajtas". sed la ŝtato ne rekonis la koloron de tiuj eklezioj. . ."

S-ro *E. Tranin*, pri politikaj malliberuloj: „. . . same en la insulo Vaigaĉa kiel en Solovecki, la malliberuloj aspektas en bonaj fizikaj kondiĉoj k ili povas esti tuj liberigataj, se ili akceptas la registarajn kondiĉojn. Por tio ili nur bezonas honore k lojale promesi apogon al la Sovetia reĝimo. . . Malliberigita grafo, kiu partoprenis la kontraŭrevolucion de Ramzin, deklaris al mi, ke precipe la vivo en Solovecki estas multe pli bona ol en urbaj malliberejoj; en Solovecki la malliberuloj ne loĝas en komunaj barakoj, sed en apartaj ĉambroj. Kiam ili tien alvenas. oni klasigas ilin laŭ aĝo, sanstato k profesio; tial ili sin trovas relative sufiĉe feliĉaj, malgraŭ sia sorto. Ekz. la profesoroj laboras en bibliotekoj, la scienculoj en bone instalataj laboratorioj ktp. La ŝtato finance zorgas pri tiuj teknikaj instaloj ĉe malliberuloj celante utiligi la ŝatatajn konojn de tiuj homoj. Dum la ripoztagoj ili rajtas fiŝkapti por si mem aŭ ĝardenkulturi laŭvole. Ilia salajro estas pagata per speciala mono, kiu cirkulas nur en ilia kampo, sed kiam ili finas sian punon, tiam ili povas ŝanĝi ĝin en tutlandan monon. Tion oni faras por eviti la forkurojn. . . Kiam oni demandis al ili pri la torturoj tiom pridiskutataj en niaj landoj, ili respondas modeste: „Sufiĉas la perdo de nia libero, por ke ni morale sufiĉe suferu k tio ankaŭ sufiĉas por nia puno." Materie ili estas pli bone ol aliloke. . . Demandite, ĉu oni povas raporti, ke ili ne plu estas traktataj beste kiel en la caraj inferoj, ili respondis, ke jes, kvankam ili ne neas siajn krimojn. . ."

S-ro *E. Ŝrajber* (Schreiber) pri turismo: „. . . La eniro en Sovetio estas principe libera al ĉiuj fremdlandanoj. kiuj plenumas la formulojn. Escepto estas farata al tiuj politikuloj, kiuj iel atakis la Sovetian registaron, ĉu per skriboj, ĉu per paroloj. . . Ne ekzistas en la mondo lando, en kiu oni povas tiom libere viziti la instituciojn, politikajn aŭ industriajn, kiel Sovetio, ĉar tie ne ekzistas privataj sekretoj en la aferoj. — Leĝe, la kompens-mono (trinkmono) estas malpermesata. Ĉe la landlimo oni devas prezenti sian monon, por ke la registaro povu kontroli, ĉu la vojaĝanto ne kontrabandas rusan monon forportante pli ol li alportis. . . la rusaj vagonoj triklasaj estas transformeblaj dumnokte en litojn, por ke ĉiuj povu dormi. La sovetiaj turistaj institutoj



STALIN

estas unu el la plej oportunaj iloj por tiuj, kiuj deziras tien vojaĝi. Dank' al ili, oni vivas multe pli malkare pro la rabatoj konsentitaj al iliaj klientoj. Krome ankaŭ ekzistas specialaj ejoj „nur" por fremdlandanoj, en kiuj oni povas trovi *ĉiujn* burĝajn akcesoraĵojn. Tiuj ejoj nomiĝas: Torgsin k ĝiaj varoj ne estas pli karaj ol alilande, ĉar la registaro tiel aranĝas speciale, por ke la turistoj ne ĉesu viziti Sovetion pro manko de burĝaj komfortaĵoj k ankaŭ por kontentigi milojn da fremdaj inĝenieroj, kiuj nuntempe laboras por Sovetio. La rusoj estas ĝenerale tre akceptemaj rilate al fremduloj. Ili diras, ke la fremdaj gastoj devas viziti kiel eble plej multe en Sovetio por povi raporti eksterlande kiel eble plej konkrete. . ."

S-ro *R. Frank*, oficiro, membro de la franca milita misio ĉe la caro, pri la rusa revolucio: „. . . k post dek du jaroj, mi povis konstati lastjare, dum mia vojaĝo al Rusio, la mirigan progreson de tiu lando. Tiuj materiaj k sociaj progresoj ne nur konstante favoras la plej grandan parton de la rusa popolo, sed ĝia rapido eĉ mirigas ĉiujn eksterlandajn senpartiajn observantojn. . ."

S-ro *A. Feiler*, pri la ruĝa armeo: „. . . la plimulto el la soldatoj estas kamparanoj. Ili estas tre bone traktataj, speciale bone nutrataj, perfekte vestataj k ekipataj. Krom aliaj avantaĝoj ili ĝuas ankaŭ bonegajn klubojn. Oni donas al ili intensajn k regulajn instruojn, tiel ke je la fino de sia servo ili reiras hejmen konante precize la sistemon de la ŝtato, ĝiajn instituciojn k ideojn, kiujn ili povas siavice propagandi en siaj vilaĝoj. Samtempe oni metas tiujn homojn en kontakton kun la laboristaro de la urboj sendante ilin al la fabrikoj por ĝui la familiaran manieron de la laboristoj en la samaj distraj kluboj k ofte la soldatoj eĉ finas sian militservon laborante en la fabrikoj. Per tiu sistemo la eduko ricevita de l'supro estas kompletigata de l'malsupro per la reciproka penetrado de la spiritoj kun celo al konstanta fratiĝo inter soldatoj k laboristoj. . ."

S-ro *E. Ŝrajber*, pri organizado de l'ŝtataj institutoj k pri la G.P.U.: „. . . ĉe la instituciaj estraroj la sistemo ne povas esti pli demokrata. Ekz. respondeculoj estas nur tri, sed ili estas sendependaj en siaj taskoj: 1 politika direktoro, 1 teknika, ĝenerala inĝeniero k la prezidanto de la respektiva soveto. kiu reprezentas la tutan laboristaron de la entrepreno. Se laboristo faras ion malbonan, li estas juĝata ne de tiuj cititaj estroj, sed de siaj kunlaborantoj mem en speciala kunveno. Ĝenerale la punoj por la ordinaraj mispaŝoj estas nur kolektiva riproĉo, sed tion oni mencias en lia laborkajero, por ke, en okazo de intenca ripetado la lab. tribunalo povu juĝi, ĉu li devas aŭ ne suferi malaltigon de salajro kiel punon. . . Kaj pri la G.P.U., ni ne forgesu, ke ĝi estas nur la nomo de la ŝtata polico, la sama kiun en aliaj landoj oni nomas: „ŝtata sekuriga polico", t.e. polico, kiu garantias al la ŝtato ĝian ekziston. Ĝi, kiel en ĉiuj landoj, intervenas ĉe la migrado de fremduloj k ĉe ĉiuj dubaj aranĝoj. Sekve ĝi ne estas eksterordinara afero, kiel oni pretendas eksterlande. . ."

Postskribo: La sama revuo raportas ankaŭ pri labormanko, religio, prostituo, vagantaj infanoj, superstiĉo, higienmanko, salajr-diferenco, analfabeteco, ktp. Sed, ĉar oni bezonus duoblan spacon, mi resumas, ke ĉiuj tiuj caraj ĝermoj estas jam parte tute nuligitaj, parte preskaŭ. Cetere oni povas kontroli la lojalon de mia ĉi tiea traduko legante la originalon en la citita specialn-o de l'revuo, kiu estas aĉetebla en ĉiuj franciaj kioskoj. Troviĝas en ĝi ankaŭ malsamaj opinioj, sed mi ne volas, ke „S-ulo" kontribuu al *vanaj* atakoj de l'kapitalista ideologio; tial mi konkludas gratulante k dankante la simpatiantojn de l'Sovetia socialismo.

Soares.

La klasbatalo tra la mondo

Pri Kentuki-procesoj en Usono.

Al dumviva enkarcerigo kondamnis la Kentuki-ĵurintaro la ministon Ĝonz (Jones). La prokurora artifiko akuzi lin ankaŭ pri konspiro portis sian frukton.

La juĝisto instrukciis la ĵurintaron: „Se vi kredas laŭ la *indicoj*, ke la defendato intence kaŭzis aŭ instigis la morton de J. Daniels, konspirante, interkonsiliĝante, kuraĝigante aŭ instigante aliajn pafi k mortigi D.; vi trovu lin kulpa k nomu lian punon morto aŭ dumviva karcero". La ĵurintaro estis instruata trovi tian verdikton, kvankam Ĝonz ne ĉeestis dum la tempo de l'pafado. La ĉefpunkto en la akuzo temis pri konspiro. Evidente oni povas ĉiun sindikatan kunvenon nomi konspira kunsido. Ciu parolo pri „batalo kontraŭ la karbkompanio k ĝia helppolicistaro" povas esti konsiderata kiel incito al pafmortigo. Prave la defendanto diris, ke en ĉi tiu kazo ne la komunumo provas puni la viron, kiu mortigis Daniels, sed la „Karbkompanio Nigraj Montoj" provas ekstermi por ĉiam iun, kiu havas la kuraĝon aniĝi al la minista sindikato. La prokuroro provas detrui Ĝonz por detrui la unuiĝemon. Kondamno al Ĝonz signifus en la lando dum jaroj averton kontraŭ ĉia unuiĝemo.

Ĝonz estis elstaranta sindikatano dum 29 jaroj. Li posedas gvid- k parol-kapablon. Tia viro estas troa minaco al la profitoj de l'karbkompanio, kies ĉefposedanto subtenas unu el la plej elegantaj kurĉevalejoj en la lando. La defendkomitato daŭrigas sian batalon por la multaj akuzitoj k krome ankaŭ por li ĉe aliaj instancoj. Ĉu vi helpis tradukinte informojn k represiginte ilin en via gazeto por instigi al subteno? *1307.*

Studentaj bataloj en Bulgario.

La studentaj manifestacioj kontraŭ k por la sanga profesoro Cankov daŭris dum pluraj tagoj. Kavaleriaj trupoj k fajrobrigadistoj atakis la manifestaciantojn. Antaŭ la parlamentejo, kie la tutan tagon manifestis la amaso, oni bruligis bildon de Cankof. Pluraj studentoj estas vunditaj. En la parlamento la prezidanto deklaris, ke li ne permesos al la amaso trudi al li iujn decidojn. *L. T.*

Propagando en la lernejoj (Germanio).

La prusa episkoparo petis la kultministron ekagi kontraŭ la komunista propagando en la nelaikaj lernejoj. La komunistoj provas en kelkaj grandaj urboj, ekzemple en Breslaŭ, formi ĉelojn en la lernejoj invitante la infanojn aliĝi la Junspartakan Ligon (junpioniroj). Per flugfolioj la nomita Ligo admonas la lab. infanojn batali kontraŭ la reakciajn instruistojn, disvastigi siajn ideojn en siaj ludoj, promenadoj k kunvenoj, partopreni en komunistaj manifestacioj k helpi al la strikantoj (per monkolektado ktp). *T. S.*

POR NIA MEDITO.

Saĝulo ne malatentas bonan parolon pro tio, ke ĝin eldiris malbonulo.

La kredo estas la substanco el tio, kion ni esperas, la atesto pri tio, kion ni ne vidis.

DISKUTEJO:

Multaj laboristoj ne estas socialistoj.

(Vidu la n-on 376/77.)

Mi nur povas aprobi la opinion, ke multaj proletoj ne estas socialistoj, eĉ se ili sin nomas tiel. Ne sufiĉas esti membro de socialista partio, pagi la kotizon k diri: jen, mi estas socialisto. Ofte mi miris, kiaj homoj pretendas esti socialistoj. La aŭstria soc.dem.partio antaŭ kelkaj jaroj tre fieris, ke la plimulto de la Vienaj policistoj apartenis al ĝi. Ho, oni skribis en lab.gazetoj, ke oni ne plu povas regi kontraŭ la popolo; eĉ la policistoj estas niaj K-doj. Sed venis la 15-a de julio 1927, kiam la Viena proletaro manifestaciis kontraŭ la malkondamno al murdintoj de laboristoj — k la samaj policistoj mortpafis 90 proletojn. La policdirekcio aranĝis novelekton de la profesia reprezentantaro k nur malmultaj policistoj konfesis sin kiel socialistoj. Vere la plej multaj policistoj, ĝendarmoj, ŝtatoficistoj ktp, kvankam devenante de la proletaro, nur estas simplaj egoistoj. Ili ŝajnigas sin esti socialistoj, — se tio estas oportuna. Sed ili tuj ŝanĝiĝas k simpatias kun la burĝa registaro, eĉ kun la faŝismo, se tio estas pli oportuna. En urboj, kie iu socialista partio atingis la regpotencon, tiaj homoj trudeme kaptas bonajn postenojn — per sia hipokrita socialista konfeso. Mirinde estas, ke tiuj uloj plej ofte sukcesas trompi la lab.partiojn, sed tio estus aparta ĉapitro pri „eraroj de la partia taktiko". Se oni logike konsideras la fakton, ke aro da bone pagataj homoj deklaras sin kiel socialistoj (sed ne agas k vivas kiel tiaj), oni devas demandi, kial tiuj personoj celadas la socialismon? Post ties efektivigo — almenaŭ en la komenca epoko — ili ja nur povus malprofiti. Oni malgrandigos — tute prave — iliajn salajrojn, forigos iliajn privilegiojn — je la favoro de nun maljuste troe ekspluatataj ministoj, vitroblovistoj ktp!

Laŭ mi, la egoismo de la homoj, inkluzive de la proleta klaso, estas la plej grava barilo kontraŭ la atingo de l'socialismo. Ne diru, ke post venko de la socia revolucio tiu stato likvidiĝos, kiel okazis k okazas ĝis nun en Sovetio. La egoismo (kulakoj, burokratoj, malutilantoj) ankoraŭ tute ne estas for en Sovetio. Sed ĝi almenaŭ estas kontraŭbatalata per edukado, partidisciplino ktp. Ni nur ne forgesu, ke la rusa popolo, ankoraŭ proksima al la naturo k iom malproksima de la okcidenteŭropa civilizo (konsiderinda avantaĝo!) pli inklinas al komuno k kolektivo. Estus dezirinde, foje esplori la socialisman problemon laŭ tiu ĉi vidpunkto (influo de la animstato).

Pensemulo.

Korekto. — Bonv. legi en n-o 376/77, fruntpaĝo, unua kolono, 16-a linio de malsupre, anst. „pluigas" — *formovas* (aŭ: antaŭenmovas).

ĈU VI SERĈAS VERKOJN DE POETOJ, KANTOJN?

Konsultante la bibliotekon de SAT vi trovas jenajn eldonaĵojn:

Prez-malaltigo! **Nova prezo!**

IZGUR, Nur volu!
Unuamaja kanto de ribelo. 48 p. . . . 0,60 mk.g.
ĤRIMA, Poemo de l'Plugisto. Originalo. 56 p. . 0,50 „
MIĤALSKI, Prologo. Bela liriko. Originalo. 64 p. 0,60 „
PROLETARIA KANTARO
(kun muziknotoj), 180 p. . . . . . *nur* 2,00 „

k por amikoj de l'scenejo:

NIA TEATRO.
2 teatraĵoj, versoj por deklamo ktp. 64 p. . . 0,50 „

ADMINISTREJO DE SAT, Kolmstr. 1, LEIPZIG O. 27.

TRA ESPERANTIO

Publikaj leteroj al multaj SAT-anoj.[1]

II

Karaj K-doj,

estu dankataj pro via malkaŝa eldiro, ke estis eraro miaflanke „intermiksi la laboristan sennaciismon kun la disvolviĝo de l'imperiismo.“ Nu, mi volas momenton konfesi mian „eraron“.

Ni do forgesu aŭ tute malatentu la fakton, ke esperanto disvastiĝas paralele kun la enplantiĝo de industrio en iu ajn mondparto k stariĝo de grandaj fabrikoj, ĉirkaŭ kiuj ariĝas densa proletaro; ni supozu, ke Marks ankaŭ eraris, dirante, ke la socialismo rezultos el la plenmaturiĝo de l'kapitalismo, — kiu ne povas ne esti imperiisma; ni konsentu, ke la evoluo de l'homaro povus esti alia ol ĝi estis; ke estus eble konstrui socialismon en la plej antikva tempo k sekve, ke tio estas ankaŭ ebla nun en la primitivkarakteraj socioj, en kiuj regas ankoraŭ la totemismo.

Reve mi do volas prezenti al mi la eblon de idilia evoluo de malfruiĝintaj popoloj, kiujn oni povus konverti al socialismo per nura predikado; ke tute ne estas por tio necesaj la fervojoj, la ŝipoj, la presejoj, unuvorte ĉiuj maŝinoj k aparatoj konstruataj en kapitalistaj fabrikoj. Mi frapu al mi la bruston, pentante pri mia „eraro“, forgesante la instruojn de Marks k eĉ de Lenin, kiu klarigis, ke la imperiismo estas la „lasta stadio de l'kapitalismo“; mi imagu, ke la proletoj el Ĉeĥoslovakio, Polio k aliaj nacioj, kiuj batalakiris sian sendependecon, estas pli feliĉaj ol antaŭe. Nu, mi estas preta konsenti ĉion, kion vi volos, eĉ, ke ĝis nun estis la diablo, kiu direktis la historian procezon, sed ke de nun estos bona dio...

Sed, karaj K-doj, pri tio ne temas. La demando estas: *ĉu oni havas en SAT la rajton erari?* Kaj se ne, tio signifas, ke en nia Asocio oni ne plu devas akcepti ĉiujn tendencojn.

Estas evidente, ke la socialistoj eraras, se la anarkistoj estas pravaj; ne povas esti dubo, ke ĉi tiuj lastaj eraras, se pravas la komunistoj ktp. Se vi ne permesas eventualan eraron; se vi mem diktas la veron: kiuj ne konsentos kun vi, tiuj estos devigataj silenti aŭ forlasi vian vere veran verejon.

Havu logikan sintenon: proponu do ŝanĝi la Statuton k postulu, ke SAT difinu al si severan politikan linion; tio signifas, ke nia Asocio fariĝu kvazaŭ partio aŭ sklave obeanta filio de iu el la jam ekzistantaj partioj.

Tion pli malpli konscie deziras partifanatikuloj; tion pli malpli kaŝe k artifike ili celas. Kaj ilia tuta opozicia agitado ideare fundamentas sur tia dogmeca spiritostato.

Via rimarkigo pri mia „eraro“ estus tamen tute prava, se mi mem proponus k celus, ke la sennaciismo fariĝu iu nova dogmo por la SAT-anoj. Sed ne estas parolite pri sennaciismo en nia Statuto. Neniam oni proponis oficialigi tiun ismon; k se iu tion farus, mi estus la unua por forte kontraŭstari. Cetere, se vi atente esploros la kolekton de „S-ulo“, vi povos konstati, ke dum la lastaj du jaroj aperis malpli da sennaciismaj artikoloj ol antaŭe. Tio estas fakto, kiu nerefuteble pruvas, ke la riproĉoj de partiaj ortodoksuloj ne havas realan bazon.

SAT ne estas dogmejo; ĉiu do havas la rajton „erari“ k la sennaciistoj ne postulas pli ol la internaciistoj...

Aliam mi montros, ke eĉ se oni volus trudi al SAT la programon de iu ajn partio, tio ne malebligus en ĝi ideajn konfliktojn.

Kaj se mi ne timus trolongigi ĉi tiun leteron, mi ŝatus montri al vi, ke vero dogme akceptita estas plejofte nur malvivaĵo, ke eraroj povas iafoje esti pli vivaj k sekve pli fruktodonaj ol iaj veroj senkritike encerbigitaj.

Ne pensu, ke mi paradoksumas k akceptu vere sinceran saluton de via

10-XII-31. *E. L.*

[1] Komparu la n-ojn 376/79 de „S-ulo“.

12-a Kongreso de SAT en Ŝtutgart (Germanio)

6.–11. aŭgusto 1932.

1-a Komuniko.

Spite la terura krizo, kiu nuntempe regas en Germanio, ni tamen akceptis organizi la SAT-Kongreson. Kvankam nia rondo estas ankoraŭ malgranda, ni tamen esperas kontentige plenumi la organizan taskon por ke la venonta Kongreso bone sukcesu. Ni alvokas ĉiujn lojalajn Gek-dojn subteni nin laŭeble.

Kongreskomitato: Estas elektitaj kiel respondeca komitato jenaj Gek-doj: Walter Neumann k Ulo (organizado), Franc Steiner (financaj aferoj), Rosel Wagner (sekretariino), Kurt Lehmann, Paul Schäfer, August Gais (ceteraj aferoj).

Kongresaliĝoj: Bonvolu *baldaŭ anonci vian partoprenon* per la ĉemetita aliĝilo. Per tio vi plifaciligas al ni la taskon.

Kongreskotizo: Pro la inflacio en diversaj landoj ni fiksis la kotizon sur la bazo de 0.60 dol.us. aŭ 15 francaj frankoj. Oni pagu la ekvivalenton laŭ monkurzo en la tago de l'pago. Aliĝiloj, kun kies sendo ne okazas samtempa pago, estas senvaloraj. Al ĉiuj aliĝintoj ni sendos kongreskartojn. Pri pagmaniero vidu la aliĝilon aldonitan al ĉi tiu n-o!

Fakkunsidoj: La aranĝontoj de fakkunsidoj interrilatu kun K-do Neumann (adreson vd. sube).

Junulara tendaro: Ĝi okazos, se sufiĉe da junuloj interesiĝos pri tio.

Informpetojn oni direktu koncize al: K-do Walter Neumann, *Stuttgart*, Vogelsangstr. 66, Germanio.

Aliaj komunikoj sekvos.

Organiza Kongresa Komitato.

EL LA ADMINISTREJO

Laŭ decido de la 11-a Kongreso en Amsterdamo ekzistas en SAT ekde januaro 1932 tri kategorioj da membroj t.e.: aktivaj, aspirantaj k subtenantaj. Konforme al tio la Asocio eldonis novajn membrokartojn k sekve nuligas la antaŭajn. Ankaŭ tiuj estas nuligataj, kies posedanto jam pagis la plenan kotizon por la jaro 1932. La malnovajn membrokartojn ili tamen ne resendu. Al tiuj kiuj jam pagis la kotizon por 1932, ni sendos la novan membrokarton iom post iom, pro urĝa laboro, sed certe dum la daŭro de unu monato.

1) **Aktiva membro,** tio estas membroabonanto, ricevas ruĝan membrokarton. Sur la antaŭa flanko estas la kutima teksto. Sur la dorsa flanko troviĝas 4 kadroj por la 1., 2., 3. k 4. jarkvarono. La kotizmarko estas la kutima, flava marko por aktivaj membroj, stampita per la datostampo. Plue troviĝas sur la dorsa flanko kelkaj linioj, kiuj servu por la kompleta adreso de la posedanto. Al aktivaj membroj, kiuj pagas per unu fojo por la tuta jaro, ni mem gluas en ĉiuj kvar kadroj la koncernajn kotizmarkojn. Kiuj pagas la aktivan kotizon kvaronjare, tiuj devas mem glui la kotizmarkojn de la 2., 3. k 4. kvarono. La unuan gluas la Adm.

2) **Aspiranta membro** povas fariĝi ĉiu persono, kiu scias aŭ lernas esperanton k aprobas la Statuton de la Asocio, sed pro iuj kaŭzoj ne povas aboni la oficialan organon de la Asocio, t.e. „S-ulo“. Konforme ni sendas al la aspiranta membro verdan membrokarton. Tiu ĉi kotizo estas pagenda per unu fojo. Aspiranta membro povas fariĝi ĉiutempe aktiva, se li (ŝi) ekabonas al „S-ulo“ k aparte tion deklaras. Tiu ĉi membro devas resendi la verdan membrokarton k ni anstataŭas ĝin per la aktiva (ruĝa).

3) **Subtenanta membro** ricevas flavan membrokarton. Tiu ĉi kotizo estas pagenda per unu fojo. Membroj de ĉi tiu kategorio povas fariĝi ĉiu persono, esperantista aŭ ne, kiu intencas subteni la organizon. Same la aliĝoj de grupoj, societoj, organizoj ktp. apar-

tenas al ĉi tiu kategorio. La jara kotizo de ĉi tiuj lastaj (kolektiva aliĝo) estas minimume la triobla de la individua membro.

Krome, ĉiu novaliĝanto devas pagi la aliĝkotizon, fiksitan en nia tarifaro (vd. sur p. 89).

Ĉiuj tri kategorioj rajtas ricevi la Jarlibron de SAT. *Adm.*

Lab. Esperanto-movado en Nederlando.

La Federacio de Lab. Esperantistoj (LEA) fariĝis la plej granda esp. organizo en Nederlando kun 1850 membroj en 50 sekcioj k 23 per jara kotizo subtenantaj organizoj (aŭ sekcioj de ili). La aliaj organizoj esp-istaj (katolika, protestanta, neŭtrala) sume nombras ĉ. 3 000 membrojn. Ni eldonas dusemajnan gazeton (formato „S-ulo") 8-paĝan en kvanto de 3000 ekz., senpage por membroj. Pro la tre malalta abonprezo (2 svis.fk. jare) ni per ĝi multe propagandas. Laŭ ni tio estas la plej bona metodo. De kiam ni starigis la gazeton, ni elspezis preskaŭ $^3/_4 - ^1/_2$ de la kotizoj por ĝi. Ne ŝparante la monon ni plej efike povis propagandi.

Pli k pli ni gajnas la simpation por nia laboro en lab. rondoj. Niaj sekcioj k membroj organizis sume ĉ. 60 kursojn kun 1800 kursanoj. Krome ni sukcesis kunlabori kun „Instituto por Lab. Klerigo" (soc.dem.-tendenca), eldonante skriban kurson (25 preslecionojn de 8—10 pĝ.), kiu ĉiusemajne estas klarigata per radio. La elsendoj okazas ĉiudimanĉe de 8.30—8.55 h. (hol. tempo) pere de stacio Hilversum. La disaŭdigojn prizorgas la VARA (Lab. Radio-Asocio). Tial ke ni ne sufiĉe frue povis decidi, la kurso nombras nur ĉ. 700 partoprenantojn. Sekvantjare ni denove tenos tian radio-kurson. Ĉar ankaŭ la nelab. esp. organizoj havas multajn kursanojn k per la kristana radiostacio Huizen same okazas radio-kurso, ni povas diri, ke en nia lando miloj estas, kiuj lernas iel esp-on.

Nia Federacio starigis antaŭ kelkaj monatoj libro-servon, kiu bone ekfunkcias. Por pli ol 100 guld. semajne ni vendas (per abonsistemo, tiel ke oni povas pagi la mendojn en 10-monataj partoj). Tiel ni sukcesas havigi al la esp-istaro esp. literaturon. Pli k pli la SAT-libroj estas vendataj. Por SAT nun aktive ni laboras ĉi tie. Estas elektitaj du perantoj en Amsterdamo, kiuj komencis jam labori. La Fed.-estraro same subtenas ilian agadon per sia gazeto „Lab. Esperantisto", en kiu ĉiudusemajne aperas pri k por-SAT-aj artikoloj. Pere de „Interkontaktilo" (malregule aperanta ciklostilaĵo, kiu servas al pli intima kontakto inter Fed.-k sekci-estroj) ni agas same por SAT.

Cetere ni propagandas per la ĵurnalaro, ne forgesante eĉ la plej malgravajn. Tion faras ankaŭ la alispecaj esp-istoj. Por prilabori la gazetaron ekzistas en nia lando Gazetarservo. Sume aperis (de ni ricevitaj) ekz. en aŭg., sept., okt. en 77, 83 k 88 gazetoj 216, 189, 175 artikoletoj, informoj ktp pri k por esp-o k ankaŭ iel kontraŭ. Inter la gazetaro estas multaj lab. gazetoj. Speciale oni raportis pri la SAT-kongreso k la kursoj. Ĉiel ni k aliaj aktive agas en Nederlando.

H. W. A. (13 025).

Esperanto ĉe svedaj tramistoj.

Nur antaŭ nelonge fondiĝis la tramista klubo esperantista en Gotenburgo (Göteborg), kun celo propagandi espon inter la tramistaro, aranĝi kursojn ktp. Jam dekomence 40 K-doj aliĝis al tiu ĉi klubo. Unuj eklernis esp-on antaŭ 3—4 jaroj, aliaj estas komencantoj. Kelkaj apartenas al SAT, k ni malnovaj SAT-anoj streĉas nun ĉiujn fortojn por aligi kiel eble plej multajn kolegojn. Kiel prezidanton oni elektis la sekretarion de l'trafik-personara sindikato. Estas decidite, ke la klubo kiel eble plej baldaŭ interrilatu kun samprofesiaj kluboj alilandaj. (Vd. la tiucelan korespondanoncon en la antaŭa n-o de „S-ulo"). Ni fidas al la progreso de nia laboro! *12 287.*

LEA-administrantoj!

Bonvolu sendi al la redaktanto de l'Jarlibro (adr.: SAT, 14, avenue de Corbéra, Paris XII) senprokraste la plej freŝdatajn indikojn pri membrostato, gazeto, adreso ktp.! Ni devas havi la informojn ĝis la 25-a!

Protestu kontraŭ la polia teroro!

SAT-membro 13 744 loĝanta nuntempe en Polio (li venis tien en novembro 1931) estis arestita la 10. 12. 31 kun ekzemplero de „S-ulo" n-o 374/75 (en Krolemska Huta). Oni esploris lin k deziris scii, ĉu „S-ulo" estas gazeto de l'IIa aŭ IIIa Internacio. Oni liberigis lin, sed konfiskis la „S-ulo"-ekzempleron.

Al redakcioj de ne-holandaj gazetoj!

Unu el la redaktoroj de la nederlanda socialdemokrata ĵurnalo „Het Volk" (La Popolo) deziras ricevi la eksterlandajn esp. gazetojn. Se estas eble, vi bonvolu sendi al li pli malpli regule vian gazeton, por ke li el ili kompilu esp. rubrikon. Sendu almenaŭ tiujn ekz-ojn, en kiuj li povas trovi iajn faktojn. Tiu redaktoro ankaŭ komprenas kelkajn aliajn lingvojn. Sendu al K-do *M. Wolters*, red. „Het Volk", Hekelveld, *Amsterdam-C.*

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo":

Geislinger Allg. Anzeiger, 27. 2., feria vojaĝo en Italio, *Industrial Worker*, Chicago, 8. 12., Katol. intrigoj en Hisp. (368/9), *Het Volk*, Amsterd., priesp. sciigoj (372/3), *Norrlandsfolket*, Kiruna, 4. 12., Infanlab. en Est.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Rahva Sõna, Tallinn (plurfoje en dec.), *L'Effort*, Lyon, 5. 12., 19. 12., *Le Travailleur Municipal*, St. Etienne, 1. 12., *Geislinger Allg. Anzeiger.*, 30. 11. (esp. ang.), *Ruhr-Echo*, Essen, 7. 11., *Signalen*, Stokh., 17. 12., *La Dépêche d'Indochine*, Saigon, 7. 10. (pri la Perer-vojaĝo, granda artikolo kun la portreto de K-do P.), *Trumglap*, Saigon, 13. 10. (indiĝenlingva gaz.; same grava rap. kun bildo de K-do Perer); *Freiberger Volkszeitg.* 12. 11., 17. 11.

Peresper. materialon enpresis:

Le Populaire, Paris, 14. 12. (sportservo), *Norrskensflamman*, Lulea, 5. 12.

*

La sveda fervojista gazeto *Signalen* eldonis specialan kristnasko-numeron bele prezentitan, en kiu troviĝas duonpaĝo esperantlingva redaktita de „Ernesto".

NIA POŜTO

Al kelkaj. — Bone rigardu viajn gazetojn, ĉar la membrokartojn ni principe sendas kune kun la gaz. krom kelkaj esceptoj. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

ARGENTINO

K-do Arizmondi Fulgencio, Carlos Pellegrini 238, *Buenos Aires*, kĉl, pri div. temoj, L, PK.

GERMANIO

Koresp-adon dez. 2 junaj esp-istoj, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI, PM, bfl. Certe resp. Adr.: Walter Nitschke, Burgstädter Str. 1 N, *Göppersdorf-Burgstädt.*

K-do Willi Hameister (bakisto), Schillerstr. 22, *Rostock*, kun Gek-doj el ĉl, pri div. temoj. Resp. garantiata.

LITOVIO

K-do L. Noreiko, Aušros al. 40, *Šiauliai*, serĉas por siaj 20 gekursanoj gekoresp-antojn en ĉl, pri ĉ. t., L, PK, PI. Resp. gar.

PORTUGALIO

K-do Leonel Da Cruz (lignoskulptisto), Rua Joaquim Casimiro 20 — 4-o D., *Lisboa*, koresp. pri nudismo, interŝ. fotojn.

SVEDIO

Studrondo serĉas koresp-adon kun Gek-doj ĉl. L, PK, PI, PM, ktp. Adr.: „La Studrondo", Poŝtkesto 789, *Stockholm I.*

Nepre legu!

Mi dez. ricevi por esp. propaganda ekspozicio div. simbolajn esp. poŝtkartojn, sigelk glumarkojn, esp. insignojn, afiŝojn ks. Sendu multnombre k rekomendite! Mi rekompencas per div. ilustritaj ruslingvaj gazetoj. Petro Surĵanenko, *Valki*, Ĥarkovska okruga, Ukrainio, Sovetio.

ENHAVO

	paĝo
La katenita scienco	87
Memore al du grandaj revoluciuloj	88
Grava avizo por ĉiuj!	89
Granda striko en la Nederlanda teksindustrio	89—90
La situacio k okazoj en Usono	90—91
Novaĵoj el Estonio	91
Letero el Finnlando	91—92
Resumo de senpartia enketo tra Sovetio	92—93
La klasbatalo tra la mondo	94
Diskutejo	94
Tra Esperantio	95—96

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)